

BELGA ★ ESPERANTISTO

Monata
Revuo
fondita
en 1908^a

DIREKTORO:

Maur. JAUMOTTE

41, Avenue De Bruyn
Wilryck-Antverpeno

Oficiala Organo de

Reĝa Belga Ligo Esperantista



Societo sen profita celo. --- Belga Ŝtatgazeto 27.6.33

LA SENFINA RONDO

Antverpeno, Charleroi, Hasselt

La flandra poeto Ledeganck skribis belan tri-logion, kanton je l'honoro de tri fraturboj kaj tiuj tri fraturboj estas Antverpeno, Bruĝo kaj Gento.

En ĉiu el ili, la poeto prikantis la specialajn glortitolojn de la tri, ĉiuj flandraj, sed tamen tiom diversaj urboj.

Ĉiujare, ĉirkaŭ la Pentekostaj tagoj, ni ankaŭ povus meti tri nomojn en honorigan lokon. Sed neniam temus pri tri flandraj urboj, nek pri tri valonaj urboj.

Ĉar la tri nomoj, kiujn ni povas tiel, ĉiujare, antaŭmeti al nia legantaro estas tiuj de tri sinsekvantaj kongresurboj: tiu de la tuja estinteco; tiu de la nuna vivoplena estanteco kaj tiu de la esperplena estonteco.

Kaj pro la magia regulo de Reĝa Belga Ligo Esperantista, kiu decidis ke, post flandra urbo, valona estos elektata kaj post valona, flandra, la tri nomoj, kiujn ni tiel kunigas, kunligos ĉiam la sudon al la nordo, ĉu per du nordaj ĉeneroj kaj unu suda, ĉu per du sudaj al unu norda.

Sed ĉiuj kune, tiuj ĉeneroj, formas allogan serpentuman ligilon, kiu traboras la graniton, la ŝtonon, la ardezon de nia industria Hanagovio, defalas de la montetoj de niaj Ardenoj kaj alfluas en la ebenaĵojn de nia flandra lando.

Ĉiuj kune, tiuj ĉeneroj prikantas, ne la glorigojn de la enloĝantoj de la diversaj urboj, kiel faris la flandra poeto, sed ili estas por ni Esperantistoj tiom da mejlokolonoj en la senfina, ĉiam peza, sed tamen ofte feliĉiga irado de nia propaganda movado.

Bruĝo, La Louvière, Antverpeno — La Louvière, Antverpeno, Charleroi kaj nun Antverpeno, Charleroi, Hasselt estas nur la momentaj vizaĝoj de la daŭra, senhalta pliantaŭenigo de nia propagando en ĉiam novaj centroj, novaj regionoj.

Sed ĉu ni iras al la havenurbo Antverpeno, kie ni estis akceptataj de grupo jam malnova kaj de vizaĝoj jam konataj: ĉu ni iras al Charleroi por esti akceptataj de niaj novaj amikoj, ĉu ni iros, proksiman jaron, al Hasselt, ĉiam ni iras al Kongreso, por tie retrovi la necesajn fortojn, kiujn ni bezonas por tutjara laborado por nia Idealo.

Tiun forton ni ĉiuj devas havi la intencon doni al niaj amikoj, venintaj el aliaj urboj, venintaj eĉ

el aliaj landoj.

Tial ni iru al la Kongreso, kiel al la granda festo de la Belga Esperantistaro, kun la deziro kaj la volo, faciligi al ĉiuj, per nia propra bona volo, la laboron; helpi per ĉiuj niaj propraj rimedoj, ĉu tiuj rimedoj estas nur konsiloj aŭ efektiva laborkapablo.

Kaj tiam, memorinte pri la antaŭa kongreso, ĝuante la hodiaŭan kaj jam antaŭvidante kun plezurego la baldaŭ estontan, tiun de la jaro 1939, ni ĝuos kune tagojn de vera feliĉo, kiujn ni ankoraŭ dum monatoj gaje memoros.

Kvankam nenie jam troviĝis informo pri tiu decido de la Ligestraro, la leganto jam, per la titolo de tiu ĉi artikolo kaj per kelkaj paragrafoj el ĝi, eksciis, ke la Kongreso, en 1939, okazos en Hasselt.

Tiu akurata decido de la Ligestraro montras al la membroj de la Ligo, ke ĝiaj gvidantoj ne nur dum tiuj ĉi lastaj semajnoj zorgis, ke, dank' al la ĉiutaga kunlaboro de la LKK en Charleroi, ĉio estu en ordo por nin akcepti plej bone, sed ankaŭ pripensis kaj jam prizorgis la daŭrigon de nia tradicio, la daŭrigon de nia Kongreslisto.

Kaj tiu konstato pri labormaniero, kiu ne nur atentis pri estinteco, ofte brila; kiu ne nur prizorgas la estantecon sed ankaŭ pensigas pri la estonteco, estos eble, por kelkaj inter tiuj, kiuj ne jam enskribiĝis aŭ kiuj ne jam decidis firme iri al Charleroi, instigilo por tamen tuj fari findecidon.

Kiam ni skribis la antaŭan artikolon, kun alvoko por Charleroi, ni havis antaŭ niaj okuloj, liston kun nur 100 nomoj.

Ni diris la nepran neceson, ke nia Kongreso en Charleroi havu duoblan partoprenantaron.

Niaj membroj kaj niaj amikoj en la apuda eksterlando honorigis nian subskribon kaj nun, unu semajnon antaŭ la Kongreso, ni jam enskribis nian 186-an aliginton.

Sed la cifero, kiun ni citis kiel nepre atingotan celon, tamen ne estas cifero, kiu ne povas esti superata.

Se la vico de niaj Kongresoj estas senfina, ankaŭ la membraro de ili estas senlima.


Kaj je la lasta momento do kongresano restas bonvena!

Maur. JAUMOTTE.


XXVII-a Belga Kongreso de Esperanto

Charleroi, 4a ĝis 6a de Junio

- Honoraj Prezidantoj:** S-ro Joseph Tirou, urbestro de Charleroi.
S-ro Jules Hiernaux, eks-ministro de Publika Instruado kaj ĝenerala Direktoro de la Labor-Universitato.
- Honora Komitato:** S-ro Jean Laurent, Distriktestro.
S-ro Georges Dryon, skabeno de Publika Instruado de Charleroi.
- Loka Kongresa Komitato:** S-ro R. Marghem, prezidanto;
S-ro C. Cafonette, vicprezidanto.
S-ro N. Molle, sekretario.
S-ro E. Severin, kasisto.
S-roj L. de Greef, V. Demoulin, R. Goodwin, E. Pettiaux, A. Ringlet, kaj J. Waterlot, komisaroj.



La kastelo de Chimay.



La preĝejo de Chimay.

Nia ekskurso

Nia Kongreso okazos en tio, kion oni kutimas nomi « le Pays Noir », eĉ en ties ĉefurbo.

Kaj, fakte, Charleroi estas ĉirkaŭata de la konataj nigraj, karbmateriaj montetoj.

Tio tute ne signifas, ke Charleroi mem estas nigra urbo. Charleroi kontraŭe estas alloga urbo, kiu, je bel-aspekto, je magazenoj ĉiuspecaj kaj luksaj, nenion devas envii al pli grandaj urboj en la lando.

Sed ĉiel oni tamen vidas, ke ĝi estas centro de grava industria vivo.

Kaj estos unu el la plezuroj de la kongreso viziti, ĉu iun grandan uzinon; ĉu la faman Universitaton de la Laboro, alturnejon, kiun oni povas, en nia lando, nur imagi al si, ĝuste en tiu urbo Charleroi.

Dum la lunda ekskurso, ni tamen elflugos el tiu industria centro, por veturi 50 kilometrojn suden, al Chimay, fama, malnova urbo, kun la kastelo de la Princoj de Chimay, la mal-

nova preĝejo kaj diversaj aliaj vidindaĵoj; kun, en la bienaro de la princa familio, — je tri kilometroj, — la belega Lago de Virelles, la plej granda akvetendado en Belgujo, pli ol 123 hektaroj, meze de 250 hektaroj da parko kaj arbaro.

Estas belega ĉirkaŭaĵo ka, la parko estas, de pasinta jaro, alirebla, kontraŭ pageto, al la publiko.

Ni, en tiu ĉirkaŭaĵo havos la okazon, resti agrable kune, dum ni vizitos plej

interesajn lokojn, por fine, reveturi al Charleroi, kie okazos la fina disiro.

Tiu ekskurso, kiu estas pli ol 125 km. longa, tre certe allogos ĉiujn kaj ĉar ĝi estos farata per speciala vagonaro, aparte organizita por niaj Kongresanoj, ĝi okazos en la plej bonaj kondiĉoj.

Ĉi apude niaj legantoj trovas kelkajn vidaĵojn el tiu bela regiono, kiun multaj certe nur konas laŭ onidiroj, sed verŝajne neniam mem detale vizitis.

Ĝenerala programo

ATENTU pri la malgrandaj ŝanĝoj en la horoj kaj en la lokoj. La Ligestraro kaj la L.K.K. atentigas ankaŭ pri la nepra neceseco observi akurate la indikitajn horojn.

SABATON 4-an DE JUNIO.

- 14.00 h. Maifermo de la akceptejo en « Passage de la Bourse ».
Vizito de delegacio al la tombo de S-ro Henraut.
- 17.00 h. Laborkunsido de Reĝa Belga Ligo Esperantista en la salonego de la Borso.
- 20.00 h. Intima kaj interkonatiga vespero en la salono de la Borso.
- 24.00 h. « La Espero ».

DIMANĈON 5-an DE JUNIO.

- 9.00 h. Ekster programo :
Katolika Di-servo en la preĝejo « Saint-Antoine » kun prediko en Esperanto de Pastro J. De Maeyer.
Protestanta ceremonio en salono de « Cercle Polyglotte ».
- 9.45 h. « Passage de la Bourse »: Kongresa kunsido. Ĝenerala kunveno de Reĝa Belga Ligo Esperantista.
- 11.00 h. Oficiala akcepto de la urbestro. Vizito de la nova urbdomo.
- 12.00 h. Fotografado de la Kongresanoj.
- 12.15 h. Vizito al la monumento de la Militmortintoj. Flordemeto.
- 12.45 h. Komuna tagmanĝo en la « Hôtel Terminus », Place Emile Buisset, kontraŭ la stacidomo, kaj ne en « Espérance », kiel indikite sur la aliĝilo.
- 14.00 h. Ekskurso al la « Usines de la Providence », en Marchienne-au-Pont. Tiun ekskurson povos partopreni maksimume 75 kongresanoj, kaj, pro la danĝero, kiun ĝi prezentas, nur sinjoroj estos allasataj. Gvidataj de du teknikistoj, oni vizitos la diversajn fakojn de la uzinoj.
Dume : la sinjorinoj kaj la sinjoroj, kiuj ne partoprenas la viziton de tiu uzino, havos la okazon viziti, grupe kaj kun gvidanto la famkonatan Labor-Universitaton, ĝian muzeon kaj la subterajojn de la malnovaj fortikaĵoj de la urbo.
- 18.00 h. Festeno en la « Hôtel Terminus ».
Poste: grandioza balo kun la orkestro « The Blig Boys' Jazz ». — Baletoj de la dancistinoj de la Reĝa Bruĝa Grupo Esperantista, sub gvidado de G-roj de Vooght, kaj dancnumeroj de F-ino Marcelle Bonge, artistino de la dancistaro de la nacia Teatro de la « Monnaie ».

LUNDON 6-an DE JUNIO.

9.30 h. Granda tuttaga ekskurso

Foriro per speciala vagonaro.

Oni estu en la stacidomo, je la 9a 15.
Tra Lobbes kaj Thuillies al Chimay.
Alveno en Chimay, proks. je la 11a.
Vizito de la urbo kaj de la Kastelo.
Akcepto en la Urbdomo.
Komuna tagmanĝo.
Poste, promenado piede al Virelles (10 km.). Vizito al la Lago (refreŝiĝo, remado, naĝo, amuzoj diversaj). Reforiro el Lomporet kaj reiro al Charleroi, tra Mariembourg.

Alveno en Charleroi ĉirkaŭ 18 h 30.

LISTO DE KONGRESANOJ:

100. S-ro G. Vanveuren, Marcinelle-Charleroi.
101. S-ino S. Alofs, Woluwe Sta Lambert.
102. S-ro A. Alofs, Woluwe Sta Lambert.
103. F-ino M. Hofkens, Antverpeno.
104. S-ro Ach. Wauters, Antverpeno.

(Vidu sekvon dorstflankojn)



La lago de Virelles.



La vilaĝo de Virelles.

Belga Esperanto-Instituto

GENERALA JARKUNSIDO

Dimanĉon, la 1-an de Majo okazis en Antverpeno en la « Esperanto-Domo », sidejo de nia koopera Societo, la ĝenerala jarkunsido de « Belga Esperanto-Instituto. »

S-ro Jaumotte, administranto-prezidanto, malfermis la kunsidon, bonvenigis kaj aŭdigis la raporton de la administrantaro pri la agado dum la societa jaro 1937-38, el kiu raporto ni ĉerpos kelkajn paragrafojn.

Post ĝia aprobo, la akciuloj aŭdis kaj aprobis la raporton de la gekomisarioj kaj la bilancon kaj kalkulon de profito kaj perdoj ĝis la 31-a de Marto 1938 kies saldo estas denove transportata al la jaro 1938-39. La kunsidantaro kvitigis per du specialaj voĉdonoj, la ad-

ministrantojn kaj la komisarojn kaj okupis sin pri la parta renovigo de la administrantaro.

Ĝi konfirmis la mandaton de S-ro Oscar Van Dijck; reelektis S-ron L. De Hondt kaj alelektis S-ron Georges Van den Bossche, kiel administrantojn kaj reelektis S-inon H. Schoofs, kiel komisarinojn dum ĝi malakceptis la eksigon de S-ro Sielens, prezentitan en la daŭro de la jaro, — pro situacio, kiu tamen intertempe sangigis, — kaj rezervitan de la Prezidanto ĝis la ĝenerala kunsido.

La administrantaro nun konsistas el: S-roj Van den Bossche (1939); Oscar Van Dijck (1940); Morris De Ketelaere (1941); Edg. De Coster (1942); Ch.

BILANCO JE LA 31-a DE MARTO 1938.

AKTIVO:

Magazeno	Fr. 114.441,68	
Meblaro	Fr. 10.720,55	
		Fr. 125.162,23
Enkaso (kaso, banko, poŝtĉeko)		Fr. 2.103,51
Garanti-deponoj (diversaj)		Fr. 1.082,65
Akciuloj (kapitalo pagata)		Fr. 51.644,12
		Fr. 179.992,51

PASIVO:

Socia Kapitalo	Fr. 120.400,—	
Laŭleĝa rezervo	Fr. 3.300,—	
Eksterordinara rezervo	Fr. 3.000,—	Fr. 126.700,—
Amortizoj: Magazeno	Fr. 23.000,—	
Meblaro	Fr. 2.835,75	
Provizo por impostoj	Fr. 1.051,40	Fr. 26.887,15
Suldantoj kaj Kreditoroj	Fr. 11.899,16	
Prunto	Fr. 9.000,—	
Dividendoj pagotaj	Fr. 84,—	Fr. 20.983,16
		Fr. 5.422,20
Profito		Fr. 179.992,51

KALKULO DE PROFITOJ KAJ PERDOJ.

DEBETO:

Administrataj kostoj	Fr. 32.712,26
Kurz-diferenco	Fr. 17,09
PROFITO	Fr. 5.422,20
	Fr. 38.151,55

KREDITO:

Transporta saldo 36/37	Fr. 13.002,43
Magazeno	Fr. 16.606,99
Presa servo	Fr. 4.563,85
Prizorgado	Fr. 3.599,—
Abon-servo	Fr. 233,70
Diversaj enspezoj	Fr. 183,58
	Fr. 25.149,12
	Fr. 38.151,55

105. S-ro E. Pettiaux, Jumet-Charleroi.
106. S-ro Louis Degreef, Charleroi.
107. F-ino A. Van Driessche, Hamme.
108. S-ro Roberto Delrue, Tornako.
109. S-ino Andreino Delrue, Tornako.
110. S-ro Albert Masselier, Neuilly.
111. S-ino Albert Masselier, Neuilly.
112. S-ro Albert Thooris, Bruĝo.
113. S-ro Léon Braet, Nieuwpoort.
114. S-ino Léon Braet, Nieuwpoort.
115. S-ro Carlos Braet, Nieuwpoort.
116. S-ro Marcel Braet, Nieuwpoort.
117. S-ro Georges Sengel, Rotterdam.
118. S-ino Sophie Sengel, Rotterdam.
119. S-ino Julia Plyson, Bruselo.
120. F-ino Louise Plyson, Bruselo.
121. F-ino Matilde Kestens, Bruselo.
122. F-ino Rachel Berton, Bruĝo.
123. F-ino Maria Mahieu, Bruĝo.
124. F-ino Germaine Verplancke, Bruĝo.
125. S-ro Pierre de Vooght, Bruĝo.
126. S-ino Paula de Vooght, Bruĝo.
127. F-ino Monique de Vooght, Bruĝo.
128. S-ro Edouard Verbeke, Bruĝo.
129. S-ro D. Van der Stempel, Koekelberg.
130. S-ino R. Van der Stempel, Koekelberg.
131. S-ro Charles Asselman, Antverpeno.
132. F-ino Albertine Lepeer, Bruĝo.
133. S-ro Louis Douchamps, Jette.
134. S-ro Louise Douchamps, Jette.
135. S-ro Fr. J. Haselier, Kerkrade (Nederl.)
136. S-ro A. Cheppe, Paturages.
137. S-ino Algrain-Coucke, Bruĝo.
138. S-ro Kurt Radnig, Berlin.
139. S-ro Gabriel Spoon, Bruĝo.
140. S-ino Spoon-Wustrow, Bruĝo.
141. S-ro A. Van Eeno, Bruĝo.
142. F-ino Marie-José Declerck, Bruĝo.
143. F-ino Obéline De Jaeger, Bruĝo.
144. S-ro M. Ballenghin, Bachy p. Cysuing (Fr.)
145. S-ro Petro Hart, Ixelles.
146. S-ino Jeanne Hart, Ixelles.
147. F-ino M. Gebler, Couillet-Charleroi.
148. S-ro Clotaire Vandeveld, Gento.
149. S-ino M. Vandeveld, Gento.
150. S-ro Paul Vandeveld, Gento.
151. S-ro Marcel Roost, Antverpeno.
152. S-ro L. Popiel, Fresnes sur Skeldo (Fr.)
153. S-ro A. Léchelle, Vicque Fresnes s Skeldo
154. S-ino J. Mannevy, Fresnes sur Skeldo.
155. F-ino M. Mestdagh, Bruĝo.
156. S-ro Marcel Dubar, Thuin.
157. S-ro J. Timmerman, Gento.
158. S-ro C.H. Bramkamp, Scheveningen (N.)
159. S-ino J.G. Bramkamp, Scheveningen.
160. F-ino J.G. Bramkamp, Scheveningen.
161. S-ro Paul Yernaux, Lodelinsart-Charleroi.
162. F-ino Lucienne Gilson, Charleroi.
163. S-ro Abato De Moyer, Nivelles.
164. F-ino Jeanne Schepens, Bruĝo.
165. S-ino Jeanne Bonge, La Louvière.
166. F-ino Marcelle Bonge, La Louvière.
167. S-ro Oscar Burton, Jeumont.
168. S-ro M. Rampanaux, Jeumont.
169. F-ino Simone Bretelle, Jeumont.
170. F-ino Léone Marsal, Jeumont.
171. S-ro Georges Pluchard, Jeumont.
172. S-ro Frederic Turner, Rochester (Angl.)
173. S-ro R. Geerinck, Sta. Nikolao (Ws.)
174. S-ino Maurice Van Wanseele, Aalst.
175. F-ino L. Lauvaux, Marchienne-au-Pont.
176. Samideano X..., Gentbrugge.
177. S-ro Charles Van Reybroeck, Antverpeno.
178. S-ino El. Van Reybroeck, Antverpeno.
179. S-ro Gilbert Messe, Morlanwelz.
180. F-ino Paula Teurlings, Antverpeno.
181. S-ro Van den Bossche Pierre, Antverpeno.
182. S-ro J. Ravestein, 's Gravenhage (N.)
183. S-ino Ravestein, 's Gravenhage (N.)
184. S-ro Dercks, Bruselo.
185. S-ino Dercks, Bruselo.
186. F-ino Dercks, Bruselo.

BELGA KRONIKO

ANTVERPENO. — **Reĝa Esperanto-Grupo « La Verda Stelo ».** — Kunvenoj « De Witte Leeuw », Frankrijklei, 4, Avenue de France, kaj: Lge Leemstraat, 127, Lge Rue d'Argile: ĉiusbate je 21a h.

Sabaton, la 4-an de Junio: Kongreso en Charleroi. La nepartoprenantoj kunvenos intime en « Witte Leeuw ».

Sabaton, la 11-an: S-ro Jaumotte raportos pri la kongreso. (Esperanto-Domo)

Sabaton, la 18-an: Paroladeto de S-ro Faes: « Kelkaj sciindaĵoj pri Alberto la ». (Witte Leeuw)

Dimanĉon, la 19-an: Granda ekskurso al Marche-les-Dames kaj Beauraing. (Fr. 50,—) Detaloj dum la kunveno.

Sabaton, la 25-an: Manĝvespero en hotelo « Le Phare », Koningin Astridplein, 3, je la 20 h. 30.

Van der Veken (1942); Maur. Jaumotte (1943), H. Vermuyten (1943); L. De Hondt (1944).

La gekomisarioj estas: F-ino Yvonne Thooris (1939); S-ino F. Staes (1940); F-ino J. Morrens (1941); S-ro H. Sielens (1942); S-ro R. Dechesne (1943); S-ino H. Schoofs (1944).

El la raporto de la administrantaro.

La rezultato de la nuna jaro, kiu estas konsiderota kiel bona kaj kiu permesas, por la sekvanta jaro, esperon ankoraŭ pli bonan, ĉar la vendado dum la tuta jaro okazos en nia nova sidejo, tamen ne permesas daŭrigi senhezite kaj senripense la vojon, kiun ni proponis kaj kiun vi decidis aliri antaŭ unu jaro.

Via administrantaro petas vin fidi en ĝi, por starigi la, laŭ ĝi, necesajn ŝparojn en la ĝeneralaj elspezoj.

NEGOCOJ: (Vendado kaj presado): Tiu negoco farita en la magazeno kaj de la oficejo atingis dum la jaro 1937/38 komerciferon de pli ol Fr. 130.000.

La administrantaro insistas apud ĉiuj membroj, por ke ili aĉetu en nia magazeno, ne nur siajn esperantaĵojn, sed ĉiujn paperaĵojn kaj artiklojn de paperejo, kies vendado same bone, kiel la Esperantaĵoj, helpas al la vivo de nia tuta afero.

Nia presa servo daŭrigis tutregule la presadon de la diversaj revuoj kaj gazetoj, kiujn ĝi jam prizorgis la antaŭan jaron kaj akiris ankaŭ kelkajn altajn fidelajn klientojn.

ELDONADO: La jaro 1937/38 estis grava societa jaro en tiu rilato.

Ni estis efektive devigataj represigi diversajn el nia propraj eldonaĵoj, kiuj elĉerpiĝis.

Tiuj represadoj de libroj en miloj da ekzempleroj, je nia propra konto, eliris en malmulte da tempo, iom multe da mono, dum la reenpezo igas malrapida kaj iom post iom kaŭzas malfacilaĵojn al la spez-fako, kiu ne plu tiel regule kaj tiel abunde disponas pri disponebla mono.

Konsiderante la malfacilan situacion de multaj el niaj membroj en tiu ĉi kriza periodo, via administrantaro tamen ne decidis alvoki ĝene-

Dimanĉon, la 26-an, ekskurso al Gheel. Detaloj dum la kunveno.

Dimanĉon, la 3-an de Julio: ŝipekskurso al Vlissingen. Foriro de la flosponto, Suikerrui, je la 8-a matene. Reveno vespere inter la 20-a kaj 21-a. Prezo: verŝajne fr. 17,50. Oni bonvolu enskribigi sin, kun familiaĵoj kaj geamikoj dum la grupkunvenoj, ĉe s-ro A. Lodem.

BRUĜO. — **Bruĝa Grupo Esperantista, Reĝa Societo.** — Ĉiumarde, je la 20-a. — **SIDEJO:** « Gouden Hoorn-Cornet d'Or », placo Simon Stevin, tel. 314.59.

KUNVENEJO: « Salonego Brangwyn », ĉe S-ano Jehansart, placo Simon Stevin, Tel. 318.23.

Kunvenoj dum Junio 1938, ĉiuj en la kunveno:

ralmaniere la 10 % de la kapitalo, kiujn ĝi rajtas ĉiujare alvoki.

Ĝi faras tamen alvokon al ĉiuj, kiuj ne plene pagis sian subskribitan kapitalon, por ke ili, se eble, pagu 10 aŭ 20 % de la subskribita sumo, por ke ĝi pli facile povu labori.

Aliflanke nia Instituto akiris la eldonrajton de la bela verkaro de nia Majstro, kunigita sub la titolo « Fabeloj de Andersen ». Tri el la kvin volumoj estis jam eldonitaj sed preskaŭ tute elĉerpiĝis, dum la du lastaj volumoj neniam estis presataj.

Estos nia zorgo dum la sekvanta jaro, antaŭenpuŝi la pluan eldonadon de tiu bela verko, kiun ĉiu Esperantisto ŝatos posedi.

KORESPONDA KURSO: Unu el niaj zorgoj dum la societa jaro 1937/38, estis la efektivigo de deziro jam de longe esprimita de la propagandaj instancoj de nia movado: la eldono de koresponda kurso simpla kaj malmultekosta.

Ni havis la ĝojon komenci la ekspluatadon de tiu kurso dum la lastaj tagoj de la societa jaro. La abonoj al tiu kurso, eldonita en la du lingvoj flandra kaj franca, ne jam kapablis influ nian budĝeton nunan, sed certe, laŭ la unua impresado akirita, influos la sekvantan.

AKCIULOJ KAJ KAPITALO: Je la 31-a de Marto 1938, la nombro de niaj akciuloj estis 207 kaj nia kapitalo subskribita Fr. 120.400.

INVENTARO: La inventaro de la ne-esperantaĵoj, same kiel de la esperantaĵoj, en iom grava proporcio, kreskis dum la societa jaro: la ne-esperantaĵoj pro la aldono, en la nova magazeno, de multaj artikloj, inter kiuj mar-moraj kaj ledaj, kies vendado ne sajnjis ebla en la kvietaj Willemsstraat; la esperantaĵoj pro la jam aludita elĉerpiĝo kaj represado preskaŭ samtempa de diversaj el niaj propraj eldonaĵoj.

Je la 31-a de Marto 1938 nia inventaro sumigis je Fr. 114.441,68.

Ankaŭ la meblara sumo plialtiĝis kompare al pasinta jaro, pro la nova arango, kiu permesas al la propaganda grupo « La Verda Stelo » disponi, kontraŭ pago de honesta kompenso, pri niaj salonoj por kursoj kaj kunvenoj.

REZERVOJ: Niaj rezervoj altiĝis je l' komenco de la societa jaro je Fr. 3.500 por la laŭleĝa kaj 3.000 por la eksterordinara rezervo, dum ni amortizis la inventaron ĝis Fr. 23.000.

La Prezidanto.
Maur. JAUMOTTE.

Mardon, la 7-an: Raportado pri la Kneve (Prez. S-ro Ch. Poupeye).

Mardon, la 14-an: a) dikto de kanto (F-ino Y. Thooris); b) Reklamvespero (S-ro H. Van Roye).

Mardon, la 21-an: a) 8-a leciono de kurso por progresantoj (Prez. S-ro H. Van Roye); b) Kantado, gvidado: S-ino Ch. Poupeye; ĉe la piano: S-ino H. Van Roye.

Mardon, la 28-an: a) Lekcio de S-ro Th. Verman, advokato pri: « Historio de Esperanto 1-a parto (Prez. F-ino M. Vanden Berghel) Esperanta kartludado (Prez. S-ro K. Decker) ».

N.B. — La grupa BIBLIOTEKO estas ĉi-fermata ĉiumarde de la 19.30-a ĝis la 20.00-a en la Sidejo, Bibliotekistoj: S-ro Karel Decker kaj F-ino M. Vanden Berghel. Tie anstataŭe samtempe: vendado kaj mendado de esperantaĵoj: libroj, steloj, poŝtkartoj, skribpapero,

HELPA VENDEJO de esperantaĵoj ĉe F-ino M. HUYGHE, Potterierei, 1, quai de la Poterie (Helpa Poŝtofiĉejo.) Tel.: 315.61.

BRUSELO. — « Esperantista Brusela Grupo ». — Kunveno: « Hotelo Liberté I », Placo Rogier, 10, ĉiulunde.

De la 7a ĝis la 8a: Dancliono.

De la 8a ĝis la 9a: Kurso.

De la 9a ĝis la 10a: Kunveno.

La kunvenoj komenciĝos per kvinminuta perfektiga kurso.

London, la 6-an de Junio: ne okazos kunveno.

London, la 13-an: F-ino Obozinski raportos pri la Kongreso en Charleroi.

London, la 20-an: F-ino Pierre parolos « Kelkaj naciaj skoloj de Muziko ».

London, la 27-an: S-ino Staes-Vandervoort parolos pri S-ino Hof (El « Literaturo de la Mondo » de Felikso Zamenhof.)

GENTO. — « Genta Grupo Esperantista ».

Leciono en la lernejo St. Pietersnieuwstraat 45, ĉiumerkrede je la 7-a vespere.

GRUPAJ RAPORTOJ.

ANTVERPENO. — **Reĝa Esperanto-Grupo « La Verda Stelo ».** — La 30-an de Aprilo F-ino Jennen, la senlaca prezidantino de Brusela Grupo, faris belegan kaj interesan paroladon pri unu el siaj plej belaj kreskadoj: la ekstrem-oriento de Eŭropo. Per tre traflumbildoj ŝi ankoraŭ pli bone povis montri ĉiujn la belecon de la vizititaj regionoj kaj klarigis la kutimojn de la enlogantoj. S-ro Jaumotte substrekis la aplaudadon, kiu rekompencis lertan paroladistino.

La sekvantan Sabaton, S-ro De Coster faris same interesan paroladon pri regiono pli apud malpli impona eble, sed same alloga per sia natura beleco: Luksemburgo.

Ankaŭ liaj bildoj estis multe ŝatataj kaj ĉeestantaro same vigle aplaudis la paroladon.

La 14-an, komuna manĝo altiris multajn membrojn, kiuj, tiel, plej bone prepariĝis por la ekskurso de la morgaŭa tago al Mariabur-

La 28-an, la kabaredvespero estis anstataŭata de tre interesaj klarigoj pri diversaj propagandaj punktoj. Tiu vespero estis gvidata, de la du vicprezidantoj S-roj Faes kaj De Hondt. Ni memorigu ke, dum tiu ĉi monato, S-ro Faes faris bonegan paroladon pri Esperanto, ĉe la « Happy Englishmen ».

BRUGŬO. — **Bruĝa Grupo Esperantista, Rega Societo.** — La 26-an de Aprilo, S-ro H. Van Roye donis la kvinan lecionon de kurso por progresantoj; post tio li gvidis tre amuzan debaton: « Por kaj kontraŭ ĉapeloj ». Multaj ĉeestantoj esprimis plej diversajn opiniojn, kvankam plejmulte oni sin deklaris « porĉapela ».

La 3-an de Majo, S-ro Poupeye gvidis la legadon kaj klarigadon de B.E.; tiam F-ino Y. Thooris, kiel deligitino de IEL, tre interese parolis pri nia internacia Ligo, ĝiaj celo, kresko kaj servoj.

La 10-an de Majo, S-ro Ch. Poupeye diktis novan kanton « Lando de Charleroi ». La vespero gaje finiĝis per intima babilado.

Sesa leciono de kurso por progresantoj estis instruata, la 17-an de Majo, de F-ino Y. Thooris, kiu donis poste plej freŝajn kaj interesajn sciigojn pri nia estonta kongreso en Charleroi. Prepare al tiu, estis poste lernata ia kanto « Lando de Charleroi », sub gvidado de S-ino Ch. Poupeye, kun fortepiana akompanado de S-ino H. Van Roye.

GENTO. — **Genta Grupo.** — Dum la monata kunsido de 20-a de Majo, S-ro Vandeveldel paroladis pri la temo: « Evoluo de la ideoj pri mondlingvo ».

Li metis sin je vidpunkto de defendo de Esperanto rilate al diroj de kleruloj, nur duone informitaj pri Esperanto (speco de Volapük?). Tiuj personoj aŭdas ankaŭ pri « plibonigoj de « Esperanto-volapük », pri novaj « sciencaj » lingvoj, ktp. Estas necese ke la esperantanoj sciu bone pri kio temas, por eventuale povi montri kie estas la eraro.

Post kelkaj vortoj pri fine forlasitaj sistemoj kiel « pasigrafioj », kaj lingvoj « a priori » (tio estas artefaritaj) la preparolanto faris komparojn inter « a posteriori » sistemoj, (do ne artefaritaj): Esperanto, Ido, Esperantido, Interlingua, Occidental, Novial. Li montris ke la laŭdirataj plibonigoj estas neutilaj komplikaj; li atentigis pri la eraro de tiuj kiuj rekomendas « lingvon unuavide legeblan por kleruloj » kiuj scias diversajn lingvojn kaj latinan; li rimarkigis ke helpa lingvo devas esti ne « tuteŭropa », sed tutmonda.

La « lingvistiko » estas bela scienco, sed se oni devas atendi por fine akcepti ĝeneralan uzadon de helpa lingvo ke la komparistoj de « naturaj » lingvoj estus akordigintaj pri la sistemo aranĝota de Komisiono, ni atendus longe, eble senfine.

Ni havas ilon kiu estas taŭga por ĉiuj uzoj, ĉu altsciencaj, ĉu de la ĉiutaga vivo. Tiu interkomprenilo estas facile lernebla por ĉiu homo kiu havas sufiĉan instruadon pri la gramatiko de sia patrina lingvo, por Azianoj kaj civilizitaj Afrikanoj kiel por Eŭropanoj kaj Amerikanoj. Kial do oni bezonus specialan lingvon por scienculoj? Kial lingvon « tuteŭropan »? Kial oni devus atendi perfektajn? Kio estas perfekteco? Por uzi iun ajn genian eltrovaĵon oni ne atendis ke novaj serĉantoj estus plibonigintaj aŭ « perfektigintaj » ĝin. La uzado montras la plibonigojn. Same pri Esperanto: se plibonigoj montriĝas nepre necesaj, ili okazos, ne per ŝanĝo de necesa « Fundamento », sed per kompostiomaj aldonoj.

Esperanto ne estas artefaritaĵo (kiel diras

erare eĉ esperantanoj); ĝi devenas de « naturaj » lingvoj, kiuj mem devenas de aliaj; sed, anstataŭ esti infano de neordaj parolkutimoj de popolo, aŭ de fantazioj de literaturistoj, esperanto estas naskita de historiaj lingvoj, per la helpo de genia kaj modesta homo.

Esperanto, kompare al diversaj projektoj havas la supercon de larĝe disvolvita literaturo. Se la esperantanoj volas ke Esperanto finfine venku, ili devas pligrandigi ĝian praktikan uzadon. S-ino De Rijcke ĝentile dankis la paroladinton.

LA LOUVIERE. — En la « Alliance Industrielle », S-ro Schmitz, inĝeniero kaj kasisto de la loka grupo, faris dimanĉon, la 22-an de Majo, en « Café du Commerce », bone sukcesintan paroladon, pri « L'Esperanto, langue technique ».

S-ro Tassin, revenante de « Radio Wallonia », ĉeestis tiun bonegan propagandan klarigon, kun S-ro Marghem, kaj kun la gvidantoj de la organizanta societo, el kiuj ni citu S-ron Ch. Emonts, prezidanto, kaj J. Goudelouf, sekretario, kiuj permesis la organizon de tiu parolado, ĉe la fino de la monata kunveno.

Gratuloj.

— Al S-ro BABILON, nia malnova samideano (Hasselt), pro lia honorigo, kiel kavaliro en la Ordeno de Leopoldo. (R.D. 8.4.38)

— Al G-roj Georges VAN DEN BOSSCHE (Antverpeno), pro naskigo de filineto Christiane (23.5.38).

— Al G-roj Maurice BOEREN (Antverpeno) pro naskigo de filo André (25.5.38).

Kondolencoj.

— Al F-ino Alice Boereboom, komitatanino, kaj al F-ino Celeste Boereboom, membrino de la Bruĝa Grupo, ni prezentas tutkorajn kondolencojn pro la kruela funebro, kiu trafis ilin en la persono de ilia karmemora Patro, S-ro BOEREBOOM, Impostricevisto pro honoro, kaj fidela amiko de la grupo, kiu mortis post longa malsano la 6-5-'38.

Perradia propagando

Niaj legantoj scias, ke nia Liga kasisto S-ro Tassin faras, jam de jaroj, dimanĉe, propagandon ĉe la mikrofono de « Radio-Wallonia ».

La 22-an de Majo, li invitis S-ron Marghem, la prezidanton de la LKK de Charleroi, kiun li prezentis kaj al kiu li donis la okazon klarigi la programon de la Kongreso, kaj fari grandan alvokon al la Esperantistoj de la valona parto de nia lando kaj de Francujo.

S-ro Tassin kaptis la okazon, por ankaŭ atentigi la ordinaraĵajn, neesperantistajn aŭskultantojn, pri la Korespondanta Kurso, eldonita de « Belga Esperanto-Instituto ».

Plej bona propagando por nia movado ĝenerale.

Hasselt 1939

La Ligestraro decidis ke la Kongreso 1939 okazos en la Limburga ĉefloko: HASSELT.

Loka Kongresa Komitato estos starigata de la Hasseltaj membroj de Belga Ligo, post kelkaj tagoj, sed jen estas jam la adreso de la

28a Belga Kongreso de Esperanto
13, Kapelstraat
HASSELT.

Paŝo post paŝo

Okaze de nia XXVIIa Kongreso, la Belga Fabriko de Lampoj « MAZDA », kiu jam plurfoje montris simpatian por nia lingvo, mendis Korespondan Esperanto-kurson por sia oficistaro.

Nia brusela amiko, kiu atingis tiun rezulton, esperas ke tio nur estos unua paŝo al vera esperantigo de granda komerca entrepreno.

Jojo.

Nia Gazetaro

Ni ne povas plendi en Belgujo pri la gazetaro, kiu, ĝenerale, tre larĝe subtenas nian movadon, enpresigante ne nur komunikojn, sed ankaŭ tutajn artikolojn.

Ni jam citis « La Patrie » (Bruĝo), kiu faras bonegan propagandon, per ĉiusemajna artikolo.

En Loveno, la semajna gazeto « Le Moniteur » ankaŭ aperigas regule artikolojn.

La ĵurnalo « L'Invalide Belge » akceptis, siaflanke, enpresi artikolon, verkitan de F-ino Jennen, « Se Comprendre ».

La detala programo de la kongreso, baldaŭ okazonta en Charleroi, estis enpresata en multaj tagĵurnaloj.

Dum via libertempo

VI POVAS HELPI

al pli facila vivado de **Belga Esperanto - Instituto** ĉar vi certe fotografos - DO bezonos filmojn, paperojn kaj ĉar vi mem ne prilaboras viajn produktojn vi vin certe turnos al ĝi por ĉiuj foto-laboroj.

Tuĵa prilaboro. Tuĵa ekspedo
127, Lange Leemstraat, 127
— ANTVERPENO —



OFICIALA INFORMILO N-RO 5.

Kotizoj. — De nun la kongreskotizo estas £ 1-10-0. La edzo aŭ edzino de kongresano, kaj gejunuloj ne pli ol 20-jaraj pagas po 15 ŝil. Pagiloj estu pageblaj al Internacia Esperanto-Ligo.

Loĝejoj kaj Ekskursoj. — Mendiloj estas jam senditaj al kongresanoj, kaj pliaj ekzempleroj estas haveblaj ĉe la kongresoficejo. La komitato ne povas garanti la loĝadon aŭ partoprenon en ekskurso al kongresano, kiu ne plenumas la kondiĉojn.

Programo. — La provizora programo jam aperis, kaj ni esperas sendi la kongreslibron al kongresanoj en junio. La jenaj novaj sciigoj, tamen, sendube interesos la legantojn:

Dimanĉo. — Multaj restoracioj en Londono estas fermitaj dimanĉe. Ni tial aranĝis komunan tagmanĝon por mil kongresanoj en Lyons' Oxford Corner House, tuj kontraŭ la Dominion Theatre, kie okazos la Solena Inaŭguro. La kosto estos 2ŝ. ĝp., kaj biletoj estos haveblaj en la kongresejo tuj post via alveno en Londono. La ceteraj kongresanoj povos tagmanĝi en aliaj restoracioj sufiĉe proksime.

La Diservo okazos en The City Temple, granda preĝejo atingebla en dek minutoj de la restoracio supre-menciita. La Diservon kondukos Pastro W. H. Downes, bone konata kaj sperta angla samideano.

La Teatraĵo okazos lunde kaj marde en la Scala Theatre, Charlotte Street, W.1. tute proksime al la kongresejo. Ĝi estos komedio: « Eliza Restiŝ » kiun prezentos la Neilson-Terry Guild of Dramatic Art, kies membroj nun kun aparta sukceso lernas Esperanton en Cseh-metoda kurso de f-ino Saxl. Duono de la kongresanoj ĉeestos la teatraĵon lunde, kaj duono marde. Je tiuj du tagoj, la kongresanoj, kiuj ne estos en la teatro, povos ĉeesti filmprezentadon en la kongresejo.

Balo. — La kongresa balo okazos Jaŭdon, en Alexandra Palace, kelkajn kilometrojn norde de la centro. Specialaj vagonaroj portas la kongresanojn al kaj de la balsalono. Bonvolu laŭeble kunporti nacian kostumon!

Vendredon vesperĉe okazos nova arango, kiu, ni opinias, plaĉos al la kongresanoj. En la Central Hall, Westminster, — unu el la plei grandaj koncertejoj en Londono — aro da tre lertaj infanoj el la Nacia Hejmaro kaj Orfejo por Infanoj prezentos al la kongresanoj allogan programon de kantoj, dancoj, kant-teatraĵetoj, korp-ekzercoj ktp.

Fakaj Kunsidoj estas aranĝitaj por Skoltoj, Bahaanoj, T.A.G.E., Katolikoj, Kvakeroj, la Unuigita Komitato por Impostoj laŭ la Valoro de la Tero, I.S.A.E., Komercio, K.E.L.I., Turismo, Aviado.

La kunsido aranĝata de la Kvakeroj estas granda kunveno sub la titolo « La Nuna Mondstato: Kiel Povas Esperanto Hodiaŭ Plej Bone Helpi al Mondfrateco kaj Internacia Peco ». Inter la parolantoj estos D-ro Edmond Privat.

Karavanoj. — Krom la jam anoncitaj, oni aranĝas la jenajn karavanojn:

Italujo: Itala Esperanto-Federacio, Galleria Vitt. Emanuele 92, Milano.
Nederlando: J. Telling, Schietbaanlaan 106a, Rotterdam.

Membraro. — Ĝis hodiaŭ (8-4-1938) aliĝis al la kongreso 1235 el 26 landoj.

Adreso por leteroj. — Sekretario, 30a Universala Kongreso de Esperanto, Haronsgate, Rickmansworth (Herts.), Anglujo.

Por la Organiza Komitato,
Cecil C. Goldsmith, Sekretario.

Instrua fakto

Pri la angla-itala interkonsento la franca teksto grave diferencas de la angla.

En la gazeto de Paris: « Le Matin », troviĝas la sekvanta artikolo pri la protokolo de la kunsido de la anglaj kaj francaj ministroj, kiu ĵus okazis en Londono:

« ... Pri la angla-itala interkonsento la angla teksto estas: „ The french ministers welcomed this contribution to European appeasement... “, kies traduko devus esti: „ Les ministres français ont considéré comme la bienvenue cette contribution à l'apaisement européen “; dum la franca teksto estas: „ Les ministres français ont approuvé cette contribution... “ Sekve la angla teksto estas pli varma ol la franca. »

Pli grava ol tiu nuanco estas la diferenco inter la tekstoj, ĉar, laŭ la franca teksto, ŝajnas, ke la francaj ministroj rajtus aprobi aŭ malaprobi agon de la angla registaro; dum la angla teksto diras nur ke ili plezure konstatis tiun agon. Feliĉe la angloj ne komprenas la francan tekston, kiu povus prave ofendi ilin.

« ... Pri la centra Eŭropo, la angla teksto parolas nur pri la ago entreprenota, ... por trovi bazon (find the basis) de paca kaj justa solvo de la problemoj ekzistantaj en tiu regiono, dum la franca teksto parolas pri certigado de tiu solvo (assurer la solution)... »

Do la anglaj ministroj serĉas la solvon, dum la francaj, kiuj trovis ĝin, opinias ke ĝi devas esti aplikata.

En la du temoj estis miskompreno malgraŭ ĝisfunda deziro interkompreniĝi; kvankam ne-grava, ĝi pruvas utilecon de Esperanto, kiu nur povas forigi tiujn, dangerajn en eblaj okazoj, erarojn, en la diplomataj kunsidoj. El « Heroldo ». Rollet de l'Isle.

PANELEKTRA

Bruxelles

108, avenue des Rogations.

Tél.: 34 09 63.

Ĉu necesas lumigilo,
Ĉu motoro aŭ maŝin',
Ĉu riparo, ĉu konsilo,
PANELEKTRA helpos vin

Atentu

Esperantistoj, por viaj poŝtkartoj, tabako, cigaroj, direktu vin al
« MAISON GRUSLET »
— Avenuo Astrid, 18 —
GENTO

Anoncetoj

Turnu vin al samideanaj firmoj

EN BRUGO

ALGRAIN-COUCKE, 23, Vlamingstr. rue mande. Tel. 334.24. Nuntempaj Nove sinjorinoj kaj knabinoj.

DE GUCHTENEERE, J. « Agence Ma Minnes », Komvest, 44, Sijmaklero, Tronog Eldoganigo, Asekuroj, Tel.: 334.22.

FOTO BRUSSELLE, Steenstr., 41, rue Pierres. Tel.: 334.11. Fotografado indus Foto-Kino-Aparatoj, Akcesorajoj, laboroj M. HUYGHE, Potteriieroj, I. Ilustritaj kartoj, ĉiuspecaj memorajoj pri Bruĝo. I. Poŝtoficejo. Tel.: 315.61.

Antoine POUPEYE, Dampoortstr. 23, St. K. Tel.: 314.61. Ĉiuj asekuoj en la tuta la Informoj sen devigo.

PH. MICHOLT, Koningenstr., 7, Rue des apud Preĝejo S-ta Walburgo. — R. manteloj.

SABBE-DE VEEN, Steenstr. 76, Rue des res. Tel.: 330.48. Floroj-Agenco de « Fleur n-ro 669.

VOLCKAERT, Geldmuntstr. 30, Rue de Monnaie. Tel.: 336.07. Porkajoj, Casajoj, birdajoj.

V-ino van VOOREN de MILLIANO, demiestr. 11, Kukejo. Fabrikejo de veraj landaj biskvitoj.

VAN DE VENNE, Bouveriestr., 59, Skulpti tombŝtonoj. Blankaj kaj bluaj ŝtonajoj.

SALONEGO BRANGWYN, S-ano Vital Jeh sart, placo Simon Stevin, Kunveno de G. E. — Kafejo — Hotelo Esperanto parolata.

STROOBANDT, Vlamingstraat, 13-15, Flamande (Tel. 334.08). — Enlandaj lin kaj lardoj. Trufitaj galantinoj; famkon pasteĉoj de grashepataĵo.

EMIEL MESTDAGH, Moerkerksche steern 113, St. Kruis: Tapetistoj, murpaperoj, piŝoj, drapiraĵoj, seĝejoj.

EN LA LOUVIERE

RENE FALISE, librovendejo, 10, strato All 1-a; ĉiuj klasikaj, teknikaj, literaturaj ESPERANTISTAJ libroj de ĉiuj aŭtoroj eldonistoj.

AUTOMOBILEJO C. WINS-MEUNIER. Haltejo. — Riparejo kaj zorga servado. Nokte kaj tage. — Tel. 282 k. 1270.

POR KORESPONDEMULO

Legiano Wilmotte Oscar, 6839, Clique 4 B Camp Mangin, Marrakech, Maroko, dezi korespondi kun esperantistino.

E. Anderegg-Chevalley, Horn am Bodens Thurgau (Svisujo) serĉas urĝe por filatelio ekspozicio, la Esperanto-Kongreso-paŝtistojn de Antverpeno 1928. Li deziras ĝin terŝanĝi aŭ aĉeti.

La esperantistaj gepatroj donas al siaj infanoj:

« PAIDOPHILE SIROPON

kontraŭ tuso, kokluŝo, fabro, ka

— Mirindaj rezultatoj

En ĉiuj apotekoj: 7 kaj 12

APOTEKO J. BONGE
— LA LOUVIERE —

La "MINIPIANO" BRASTED


PREZENTATA
DE

GUSTAVE FAES

Schoenmarkt, 16¹
Marché aux Souliers
ANTVERPENO

KOSTAS

Fr. 4.400,—



Gustumu la bonegan

YOGHOURT "NUTRICIA"

- ĉiam freŝan. -

Produktaj por ĉiuj dietoj, por plenkreskuloj kaj infanoj. Ĝenerala Deponejo:

Sta Jakob-strato 8, BRUGO.

CREMERIE DE DIXMUDE

F-ino M. M. MESTDAGH
St. Jacobstr., 8, rue St. Jacques
BRUGO.

Specialaĵoj: Butero de Dixmude, Tel.:
Ovoj, Fromaĝoj 318 52

OSTENDO

BELGUJO

HOTEL VROOME

RENDEUVUO DE LA ESPERANTISTOJ
20, BULVARDO ROGIER. — Tel.: 37.

BELGA MARBORDO

Grand Hôtel d'Oostduinkerke

Bone konata de multaj Esperantistoj.

P. BENOIT, Delegito de U. E. A. Posedanto

HOTEL DU CORNET D'OR

2, PLACE SIMON STEVIN (BRUGO)

Sidejo de la Bruĝa Grupo Esperantista (Reĝa Societo).
— Tre komfortaj ĉambroj, bonaj manĝaĵoj. —
Oni parolas Esperanton. — English spoken. DS (106).

"GEVEA" SAPO...

bonega saĵo...

do: VIA SAPO!

mendu ĉe:

G. VERMANDERE

Wetstraat, 15, Antverpeno

ĜESTRARO DE „BELGA LIGO ESPERANTISTA“

Prezidanto: D-ro Paul Kempeneers, 19, Avenue Montjoie, Uccle. (Tel.: 44.53.00.)

Vicprezidantino: F-ino Yvonne Thooris, 4, Wijnzakstraat — Rue de l'Outre, Bruĝo. (Tel.: 320.86.)

Vicprezidanto: S-ro Maurice Jaumotte, 44, Avenue De Bruyn, Wilryck (Antverpeno). (Tel.: 777.58.)

Sekretarioj: S-ro Ch. Poupeye, 42, Elf Julistraat, Bruĝo.
S-ro Swinne, 77, Rue Nieuwenhove, Uccle.

Kasisto: S-ro André Tassin, 1, rue St Joseph, La Louvière.

Por pagoj de kotizoj, anoncoj, abonoj kaj donacoj:
P.C.K. 1337.67 de Belga Ligo Esperantista
(La Louvière).

Por pagoj al I. E. L.:

grupanoj al la P.C.K. de sia grupo;
izoluloj al la P.C.K. de Belga Ligo
Por ĉiuj aliaj rilatoj pri I.E.L. sin turni al:
S-ro G. Van den Bossche, teritoria sekretario.
Rembrandtstr., 7, Antverpeno.

Por pagoj al Belga Esperanto-Instituto:

P.C.K. 1689.58, Antverpeno (Lange Leem-
straat, 127).